

La Granda Insulo

€ 30 la jara abono

aperas monate krom en julio kaj aŭgusto

SEKECO KAJ INUNDO REGAS FEBRUARON

Jen sekeco jen inundo

Pluvo mistrafas sian rendezuon la unuan duonmonaton en Antananarivo kaŭze de la fenomeno El Niño dum dektaga pluvo kaj ŝtorm-inundo mortigis 6 homojn ĉefe en la nordo de la lando.



Tragedio de la 7a de februaro 2009



Ravalomanana sin senkulpigas: li neniam mortigis iun, li neniam vendis parcelon de tero, iu alia kolonelo pretendis riveli la sekreton al kiu referencis tiu eksprezidento. Tiu kolonelo akuzis Andry Rajoelina-n, la transirperiodan ŝtatestron, kiel la solan kulpulon.



Rajoelina kaj Ravalomanana

Kolera manifestacio

La vendistoj preter la ŝoseo centro de Antananarivo kontraŭ la perforto far la uranoj al kiuj la urbestrino ortojn preterstratajn. Policianoj provokis skandalon kaj kole-



en la urbo-nifestaciis baj policdonis forigi ĉiujn nelicajn komercisja vundis unu el iliaj kolegoj kaj tion de multaj homoj.

Pro la ĉina novjara festo,

malagasaj komercistoj prokrastas sian vojaĝon en Ĉinio. Fakte, Ĉinoj kutimas viziti siajn geparencojn, ĉiuj firmaoj kaj butikoj estas fermitaj dum kelkaj semajnoj. Malagasaj komercistoj atendas la finon de tiu ĉi monato antaŭ ol atingi ĉefe Guangzhou-n.

Elektita senatanestro

Honoré Rakotomanana estis elektita senatanestro. Li jam estis en la sama posteno dum la unua mandato de Ravalomanana. Fakte, Rakotomanana apartenas ankaŭ al la partio AREMA de l'eksa prezidento Ratsiraka Didier. La nuna prezidenta partio HVM kolektis ĉiujn ulojn de AREMA por prepari la prezidentecon en 2018.



Ni donos sed...

La Monda Banko konsentis doni al Malagasio 690 milionojn da US dolaroj, kiujn ĝi ekdisponigos al la lando nur en la dua semestro de la jaroj kondiĉe ke la registaro efektivegu la postulitajn reformojn, la politikan stabilecon kaj la bonan mastrumadon de la ŝtata financo.

Nova ambasadoro de SudAfriko

en Malagasio, Maud Vuyelwa Dlomo, prezentis la kopion de sia akreditdokumento al la malagasa ministrino pri eksterlandaj aferoj. SudAfriko provis ludi gravan rolon en la solvado de politika krizo en Malagasio.

Elektronika karto

estos uzataj de la administracio por aĉeti karburajon ĉe la benzinstacio por forigi la ŝteladon far maliculoj kopiante la paperan permesilon. Ankaŭ ĉiuj fremduloj rezidantaj en Malagasio devas anstataŭigi sian paperan rezidant-karton per la elektronika karto antaŭ la venonta novembro.

Oficialaj ekzamenoj

Ministerio pri edukado decideŝtataj kandidatoj dum ofialtigi la elspezojn kaj por preĉar ne fidinda estas la nomdatoj. Ĉiu kandidato devos atestas ke li/ŝi efektive lernivelo.



dis limigi la nombron de cialaj ekzamenoj por malventi la malbonan rezulton bro de vere kapablaj kandidomtri dokumenton, kiu nas en la koncernata klas-

Efektiva prezmalaltiĝo de la karburajon

Finfine uzantoj de gasleo povis profiti el la 300 ariary da prezmalaltiĝo dum tiuj de benzino devis kontentiĝi je 50 ariary. Respondeculo pri karburajon klarigis ke tiun situacion rezultigis la malaltiĝo de la petrol-prezo en la internacia merkato.

US soldatoj

Diskrete kaj dumnokte alteriĝis iu aviadilo transportinta usonajn oficirojn kaj nur pere de fejsbuko kelkaj homoj aŭdis pri tiu sekreta novaĝo. La registaro daŭre silentas kaj kelkaj ĵurnalistoj konjektas ke onidiroj pri ĉeesto de islamaj teroristoj en la nordo de Malagasio pravigas la alvenon de tiuj soldatoj.

La registaro estas forte kritikita

kaj de la internacia komunumo kaj de la civilaj societoj pro la koruptado, fuŝa mastrumado kaj ankaŭ pro tio, ke ĝi malfruas starigi instituciojn, kiujn postulas la nuna konstitucio.

Onidiroj pri la onta ŝanĝiĝo de la nuna konstitucio

ĉar ŝajnas ke la artikolo 54 tre ĝenas la nunan prezidenton. Tiu artikolo ja diras ke deputitoj proponas al la prezidento 5 nomojn el kiuj li devas elekti unu kiel ĉefministron.

Malagasio bezonas 15.000 tunojn da saketoj

jare sed mankas fekulo el manioko por fabriki biosaketon. La loka firmao Gasyplast en Antananarivo kapablas produkti ĝis 360 tunojn da biosaketoj se ĝi disponas tiun krudmaterialon. Antaŭ jardekoj, la lando disponis fabrikon de fekulo el manioko.



Unu miliono da homoj estas minacita



de malsato en la sudo de la lando. Tamen iu respondeculo de la nuna registaro senhonte asertis ke en la sudo homoj sufiĉe bone manĝas kaj abundas akvo kaj li petas ke oni ĉesu mensongi pri la tiea situacio. Tri infanoj jam mortis en Ambovombe Androy ĉar mankas al kamparanoj mono por aĉeti manĝaĝojn.



RETKURSO EKDE MARTO 2016

Dum mia lasta vojaĝo tra Malagasio kun la teamo de Nomad'Kurso, kelkaj homoj reagis pozitive aŭdinte pri Esperanto. Ni provis klarigi al ili pri la naskiĝo de la lingvo kaj ĝia nuna stato ne nur en Malagasio sed ankaŭ en la tuta mondo. Estas vere ke ni ne ĉiam sukcesis konvinki ĉiujn lerni la lingvon tamen gejunuloj ŝajnis pli allogitaj de tiu nekonata lingvo. Sekve, la sama rakonto okazis en Morondava. Unue, en la gastiga centro Tsaravahiny, la respondeculoj deziras lerni la lingvon. Kaj poste en la urbocentro la filino de Clarke kaj Nirina (kiuj siatempe renkontiĝis en Esperanto-Klubo en Antananarivo antaŭ la jaro 2000 !) ŝatas lerni Esperanton kaj ni jam donacis al ŝi poŝvortaron eldonitan de SAT Amikaro. Fine la respondeculoj de la privata lernejo LYCEE PRIVE GABRIELLE en Morondava informis nin pri tio, ke s-ro Rasolofo Roger instruis Esperanton al kelkaj ĝiaj gelernantoj dum monatoj sed poste foriris kaj neniam plu revenis tien. Ili do esprimis la deziron relerni la lingvon.

Cetere, tri homoj interesiĝis pri Esperanto en Ambalavao kaj nia amiko Nicolas tuj provizis al ili enkondukan kurson ĉe nia hotelo. Temas pri membroj de la eksklubo starigita de Gynet dum lia restado en tiu urbo. Al ili aldoniĝis la nomo de la respondeculo de la gastigcentro VOZAMA en Fianarantsoa kiu intencis ankaŭ lerni Esperanton.

Sed la plej granda nombro de gelernantoj troviĝas en Toamasina (en la privata lernejo de Cléophrane) kaj en la eduka centro Gazela, estrita de pastoro Miora. Ambaŭ povas iĝi provizejo de Esperanto-parolantoj se ni kapablas eduki ilin en tiu direkto. La lastaj koncernitoj estis tiuj ĉiĉeronoj en Antananarivo kiuj senhezite informiĝis pri Esperanto kaj lasis al ni siajn telefonnumerojn.

Forigi la distancon

La ĉefa problemo estas la malraj gelernantoj. Feliĉe ke la lalireblaj per la reto kvankam la ado ne ĉiam ĉeestas. Malgraŭ nunajn kursojn al retaj kursoj. cionojn ekde marto. Tamen, la ĉeestantaj kursanoj, mi bona akirado de la kapableco ĉapelitaj literoj kaj de la akcena- ankaŭ sondokumentojn mp3



proksimeco de tiuj futuroj, kie ili loĝas estas kvalito de la retkonektio, ni povas adapti la Ni intencas eksendi lesame kiel mi faras kun multe insinstas pri la pri prononcado de toj. Tial nepras aldoni por al kutimigi ilin

aŭskulti esperantajn vortojn kaj frazojn. Ili ĉiuj sekvos la saman lernoprogramon ellaboritan de UME. Necesas al mi aĉeti duonprofesian mikrofonon por taŭge sonregistri parton de tiuj lecionoj. Kaj viziti ofte retkafejon por sendi ilin kaj ricevi la korektindajn taskojn. Jen estas nova defio por Esperanto Plus en Malagasio kunlabore kun UME. Por akiri maksimuman nombron da retkursanoj, mi informis pri tiu kurso per fejsbuko. La unuaj lecionoj estos sendotaj al ili probable meze de marto 2016.

Henriël

KAMPARA MUNICIPO MAHITSY

Laŭsosea kontruita urbo

Mahitsy troviĝas je 30 kilometroj en la nordo de Antananarivo. La urbo kaj ties aktivaĵoj estas kontruita preter la nacia vojo N°4 al Mahajanga. Mahitsy estas unu el tiuj kamparaj municipoj en la distrikto de Ambohidratrimo. Mahitsy signifas « tiu, kiu estas rekta, linieca » ĉar la nacia vojo ja ĝin rekte trairas.

Kokinbredistoj

La ĉirkaŭaĵo famiĝas pro kokinbredado por produkti kokinaĵon kaj ovon. Multaj komercistoj de la ĉefurbo kaj de la provincoj iras al tieaj etaj farmbienoj por sin proviziumi je tiuj varoj kaj aĉetantoj plimultiĝas precipe antaŭ diversaj festoj (kristnasko, novjaro kaj pasko). Averaĝe 50.000 ovoj eliras el tiu urbo ĉiutage.

Rapida disvolvigo

Antaŭ deko da jaroj, Mahitsy estis sufiĉe malgranda urbo, kies ĉefa ekonomia aktivaĵo situis preter la ŝoseo. Kaj tiam ĝi estis konata danke al iu hospitalo konstruita de Ĉinoj kvankam la hospitalo troviĝas je kvin kilometroj pli norde de la urbocentro. Sed nuntempe, eblas konstatis ke pli rapide disvolviĝas tiu municipo. Du bankoj ja staras tie kune kun kelkaj institutoj de mikrokredito. Krome, pliboniĝas la infrastrukturo pri edukado i.a. la nova liceo, kiu helpas al la gepatroj ŝpari monon. Kaj eĉ plie, supera instituto privata malfermiĝis por akcepti la lokajn studentojn. La urbo prosperas ĝuste pro la disvolvigo de la kokinbredado kaj la pliboniĝo de la rikoltoj de diversaj manĝaĵoj kiel rizo, manioko kaj maizo.


Ĥaosa



Tamen, la disvolvigo de la municipo fariĝas iom ĥaose, la nombro de loĝantoj plimultiĝas, vendistoj plenigas la trotuarojn tiel, ke aŭtoj kaj preterpasantoj apenaŭ libere cirkulas tra la urbo precipe dum sabato, la bazartago de la municipo. Ĉiuj volas havi lokon preter la nacia vojo kvazaŭ alia ejo ne taŭgus por komerci. Krome, malbona estas la stato de la ŝoseo en la centro de la urbo. Vizitantoj do havas la impreson ke Mahitsy iĝas troloĝata. Alia kritikinda flanko de la urbo estas tio, ke mankas en tiu municipo taŭga loko por bone manĝi. Multas la rapidmanĝejoj kaj restoracioj sed ties posedantoj ne sufiĉe profesie laboras. Tial Mahitsy ne allogas la pasaĝerojn de « taxi-brousse » (buso por la kamparoj) por matenmanĝi nek por tagmanĝi.

Ampanotokana : bazaro de zebuoj

Fine, menciindas tio, ke tri kilometrojn post Mahitsy troviĝas la dua plej granda bazaro de zebuoj en Antananarivo, temas pri la vilaĝo de Ampanotokana. En ĉiu mardo, bredistoj kaj komercistoj el la kvar anguloj de la lando iras tien por vendi aŭ aĉeti zebuojn. En ĉiu mardo reviviĝas butiketoj el tero servantaj kiel vendejoj de diversaj artikloj aŭ ankaŭ kiel manĝejoj.



KIAL MALAGASOJ ESTAS MALRIĈAJ ?

Supraĵa konstato

Promenante tra granda urbo kiel Antananarivo, la vizitantoj tuj rimarkas la amason da rubuoj, kiuj staplas ie kaj tie. La truoj ornamas la ŝoseojn kaj la muroj de domoj starantaj preter publikaj vojoj jam delonge ne estis farbitaj. Homoj portas ŝiritajn vestojn foje malpurajn kaj plimulte de ili nudpiede trairas la vojonojn. Oni ofte renkontas malnovegajn aŭtojn, kiuj daŭre funkcias tamen ili eligas densan nigran fumon. Elektro estas interrompita dum kelkaj horoj en la tago, ĝi estas multekosta tial la urbanoj preferas uzi lignokarbon por kuiri la manĝaĵon. Sed tio ĉio estas nur la fasado, kiu kaŝas profundan mizeron ne nur en urbo sed ankaŭ en kamparo.



Tamen potencialo ne mankas

Kaj aŭtomate aperas la demando « Kial vi, Malagasioj vivadas en mizero kvankam via lando estas tre riĉa ? ». Jen demando tute legitima sed kies respondo estas kompleksa tamen la demandinto pravas ĉar Malagasio disponas riĉajn naturfontojn, kiuj tre diversas. La plimulto de ili estas aŭ ankoraŭ ne ekspluatita aŭ malbone ekspluatita de senkrupulaj firmaoj. Ĉiuokaze, granda procento el la firmaoj devenas de eksterlando kaj ne multe kontribuas al loka disvolviĝo de la lando. Alia riĉaĵo de la lando estas sia juna popolo sed regas ankaŭ senlaboreco en la urboj dum la ĝejnuloj forlasas la kamparon esperante trovi pli bonan vivon aliloke.

Kio malfortas ?

Eblas nur mencii ĉi tie kelkajn faktorojn, kiuj malhelpas Malagasion disvolviĝi.

-tro fortas analfabeteco : preskaŭ duono de la loĝantoj estas analfabeto el kiu plimultas virinoj. Kulpas la edukistemo, kiu ne favoras scioakiradon pro manko de instruistoj, lernomaterialoj kaj eĉ biblioteko.

-pezo de la tradicio : tradicio daŭre privilegias viron al virino, pliaĝulon al junulo. En kelkaj regionoj, tradicioj malhelpas la praktikadon de moderna higieno kaj sanprotektado. Ankaŭ diskriminacio el devenloko kaj tribismo daŭre persistas.

-politikistoj profitas kaj trozas sian povon. Ili ne serĉas la komunuman bonfarton sed sian propran intereson kaj ne hontas utiligi ekz. tribismon por plifortigi sian pozicion. Cetere, pliaĝulaj politikistoj ne preparas la transiron de la povo al la novgeneracia politikistaro. Politiko sinonimas nur rapidan manieron pliriĉiĝi.

-mankas disciplino kaj kohera disvolviga politiko : civitanoj apenaŭ timas policianojn kaj anarĥio



regas se konsideri nur la nombron de vendistoj sur la trutuaĵoj de la ĉefurbo. Krome, mankas

al la sinsekvaj registaroj taŭgaj planoj por disvolvi la landon. Neniu respondeculo anticipas pri kio okazos post du dek-tri dek jaroj.

-energio mankas kaj la medio estas detruita : ofte paneas elektro pro oldeco de la ilaro kaj pro alta kosto de gasoleo. Krome, homoj uzas lignokarbon ĉar gaso kaj elektro tarife ne alireblas. La medio estas pli kaj pli detruita, firmaoj ne respektas la regulojn kaj poluadas la ĉirkaŭaĵon en la ĝenerala indiferenteco.

-regas koruptado je ĉiuj niveloj : tribunalo estas la ĉampiono sekvita de polico kaj ĝendarmoj. Administracio tiel same kiel privataj firmaoj estas makulitaj de koruptmanio. Nur mono kaj bonaj rilatoj iĝas la ŝlosilo de la vivo en la lando.

-mankas sekureco : banditoj kaj bovŝtelistoj disponas la samajn armilojn kiel tiujn de soldatoj. Prizono estas plenplena de krimuloj el kiuj pli kaj pli multiĝas ankaŭ policianoj, juĝistoj kaj ĝendarmoj.

-potencaj landoj ankaŭ favoras tian situacion : kiam kamparanoj forlasis sian loĝlokon pro manko de sekureco, fremdaj homoj venas tien por ekspluati riĉfonton. Dum malstabla periodo, iuj fremdaj landoj/firmaoj faris komercan kontraktan kun aŭtoritatoj por akiri grundon aŭ minejojn, por fiŝkapti ĉe la malagasa marteritorio...

Kion fari ?

Ĉar temas pri vere kompleksa afero, eblas nur proponi kelkajn padojn (por eviti uzi la vorton « elirvojo »).

-Adapti la eduksistemon al la lokaj realecoj : de la tutinfana edukejo ĝis la universitato, nepras renovigi la enhavon kaj la stilon de la instruado. Nepras prioritati la dungadon de futuraj instruistoj al kiuj oni provizos kvalitan trejniĝon helpe de fakuloj kaj specialistoj pri edukado. Necesas uzi la patrinan lingvon en la instruado almenaŭ por la elementa kaj gimnazia niveloj. Ne nur la instruisto estu la sola scifonto sed uzi ankaŭ la reton kaj la novajn teknologiojn.

-Adapti la politikan sistemon al la loka pensmaniero : Malagasio tradicie havas sian propran formon de demokratio, la *Fokonolona* (la komunumo en sia plej eta formo administracia), kies aŭtoritato deiras de la bazo al la supro (cf. Parto de la malagasa historio).

-Ekuzi renovigeblajn energifontojn kaj protekti la medion : Malagasio disponas plurajn riverojn, kie taŭgas instali elektran akvobaraĝon. Bone uzeblas ankaŭ vento kaj suno preskaŭ la tutan jaron.

-Reenkonduki la civilan naciservadon por ke gejunuloj okupiĝu pri plantado de arboj dum unu/du jaroj.

-Klopodi por akiri iom post iom ekonomian aŭtonomecon : 70% de la ŝtata buĝeto devenas de la eksterlanda financado. Tion oni ne pre inversigi se nia registaro ne timas ŝanĝi la manieron mastrumi la financon de la lando.

-Pliproksimiĝi al Azio por fabriki sian propran modelon de disvolviĝo : ĉiujare la ŝtato devas doni al miloj da studentoj stipendion por studi en ĉinaj, japanaj, indoneziaj, vietnamaj, barataj...universitatoj kaj inspiro el la aziaj modeloj por disvolvi la landon.

-Revalorigi la malagasan lingvon, pensmanieron kaj kulturon : politikistoj uzas ofte la francan, kio okazigas miskomprenon al kamparanoj. Uzado de la malagasa en ĉiuj sferoj de la

vivo plifaciligas la rilaton inter la popolo kaj la aŭtoritatoj.

-Taŭge uzi la novajn teknologiojn cele al rapida disvolviĝo : bela ekzemplo estas la poŝtelefona bankado danke al kiu eĉ analfabeta kamparano sekure sendas monon al aliaj homoj aŭ ricevas monon de ili.

-Difini novan formon de patriotismo : tiu vorto pli kaj pli eksmodiĝas tamen ties esenco estas necesa por ke la popolo formu unuecan komunumon, kiu kune konscias pri la valoro de sia lando kaj de sia kulturo.



Necesas tamen iu startigilo

La demando estas ĉu la startigilo komenciĝos ĉe la bazo por instigi la tutan socion moviĝi al renoviĝo aŭ ĉu denove necesas trovi iun karisman homon por estri la ŝanĝon ? Aŭ ĉu ni misfaris nian nunan demandon ?

Henriël



E.D. Andriamalala (1918-1979) estis la unu el la raraj intelektuloj malagasaj, kiuj verkis romanojn. Li estis profesia kontisto ĉe diversaj firmaoj. El liaj verkaĵoj travideblas tio, ke li abomenas ĉion, kiu detruas la malagasan kulturon. La suba ekstraktaĵo el Taolambalo (homa ostaro) primokas la senhontan fisintendon de Rasolofo, kiu perfidis siajn samlandanojn por akiri honoron kaj riĉaĵojn.

PATRUJ-VENDISTO

Antaŭ li abrupte aperis en la supra etaĝo lumeto, kio instigis lin rigardi tiun altan konstruaĵon troviĝantan trans la ŝoseo.

-La domo de Rasolofo ! senpripense diris li.

Tiu ĉi estas unu el la domoj de Rasolofo. Kaj tiuj moviĝantaj ombroj viditaj de Rivo de ekstere estis homoj, kiuj partoprenis en la funebra vesperkunveno okaze de la morto de Rasolofo.

Rideto aperis ĉe la liparo de Rivo kaj liaj pensoj trakuris la pasintecon...Rasolofo ! Li komplicis kun la koloniistoj por subpremi fizike kaj psike la samsangajn Malagasojn. Rasolofo estis la estro de mallaŭdantoj kaj primokantoj de tiuj, kiuj kuraĝis paroli pri « sendependiĝo », tial li estis tre aprezita de « Vazaha¹ » kaj li estis unu el tiuj raruloj, kiuj akiris altan postenon en la administracio.

-Mi vokis vin Rivo, li diris al tiu junulo iutage, kiam ambaŭ daŭre troviĝis en la marbordo...Mi vokis vin pro tio, ke alvenis iu oficiala papero far la regionestro koncerne vin. Kion vi faris en Vatomandry ?

-Mi turismumis, diris Rivo.

Rivo sentis ion pikdoloran ene de si kiam li pensis ke Malagasoj ne rajtas libere moviĝi eĉ en sia propra lando ! Ekzistas neniu loko, kie eblas fari tri paŝojn sen suferi kontrolon kaj enketon...

-Vi bone scias ke ni estas en plena milito, diris Rasolofo, tiel nepras spionsekvi ĉiujn dubindajn homojn...

-Ĉu mi estas en la listo de tiuj dubindaj homoj ? ridete demandis Rivo.

-Ekde nun, jes !

-Kial ?

Rasolofo nenion respondis sed replikis :

-Pro kiu motivo vi ne salutis la regionestron de Vatomandry ?

-Mi ne konas lin.

-Konata aŭ nekonata, nepras saluti kiam temas pri Vazaha...Ĉu tion vi ja ne scias ?

-Jes, mi ne scias tion.

-Mi bedaŭras ĉar tio okazis post la apero de tiu stulta leĝo, kiu donis privilegion al diplomitoj, alie,...

Alie, li enkarcerigus Rivo-n dum kvin tagoj pro tio, ke li mistrafis saluti Vazaha-n ! ...Kvin tagoj dum kiuj oni seninterrompe plenumas la plej pezajn kaj aĉajn taskojn. Kaj ĉiuj blankuloj, kiuj havas bonan rilaton kun la administracio rajtas tiel agi vid-al-vide de ĉiuj Malagasoj.

1.En tiu ĉi kunteksto, ĝi signifas Francojn.

-Kiun diplomon vi havas ? ripetis Rasolofo, kiu samtempe kuŝsidaĉis en sia seĝego.

Tio ĉio estas ne sekreto por Rasolofo ĉar ambaŭ frekventis samajn lernejojn. Li bone scias ke ne la avantaĝo pri kapableco helpis lin akiri tiun postenon sed kaŭze de lia kapableco pugolekemi kaj rampemi ! Kaj li scias ke ankaŭ tion scias Rivo. Tamen li emis substreki al Rivo ke ja nenian rilaton havas ambaŭ nun.

Rivo ekridetis kaj li ekcitis tion, kion li havis.

-Mi fermas la okulojn ĉi-foje, diris Rasolofo, sed memoru ke mi sekvos vin !

-Mi dankas ! respondis Rivo kaj li prenis sian ĉapelon.

La kolektado de rizo bezonis homon severan kaj senindulgan, tiam oni venigis Rasolofon al *Imerina*¹ kaj li opiniis ke ne kompleta estis lia vivfeliĉo se li ne anstataŭus la patrinon de siaj sep infanoj per iu alia tre juna knabino.

Tiam Malagaso ekaktivis politike ĉar ĉiuj kolonioj esperis renoviĝon pro la pakto far ĉiuj potencaj landoj en San Francisko la 26an de junio 1945. Do, Rasolofo denove vokis Rivo-n kiam li sciis ke la junulo revenis en la ĉefurbon.

-Mi aŭdis onidirojn laŭ kiuj oni postulas la sendependiĝon...Mi esperas ke vi ne estas el inter tiuj vekigantaj revuloj kaj tiel vi povas helpi min abortigi la projekton de Rabejof².

Li deprenis el la tirkesto amason da monbiletoj rigardante Rivo-n :

-Kiom ?

Kiom kostas pogrando Malagaso ?

Kiom kostas ilia homa digneco surtretita dum ses dek jaroj ?

Nenion diris Rivo, nur larvoj silente tralikis liajn vangojn.

Rasolofo !... Tion ĉion li faris tamen la riĉaĵo interŝanĝe kaj la « honoro » tiukoste ne kapablis protekti lian vivon kontraŭ la forprenado de la morto.

E.D. ANDRIAMALALA
in *Taolambalo* pp. 145-160

1. *Imerina* estas tiu regiono, kiu enkludas Antananarivo kaj ties ĉirkaŭaĵon.

2. Temas pri iu alia viro postulanto de sendependiĝo.

TRADICIA NOCIO PRI LA JAR-DISDIVIDOJ

Jemas fakte pri la kvar grandaj disdividoj de la jaroj : la *lohataona*, la *fahavaratra*, la *fararano* kaj la *ririnina*. Ili ne ĉiam koincidas kun la nocioj de sezono al kio ni alkutimiĝas. Ni provas priskribili ilin laŭ la maniero laŭ kiu la *Ntaolo* — la PraMalagasoj — komprenis tiun fenomenon.

La *lohataona*

Laŭvorte ĝi signifas « la kapo de la jaro » kaj ja temas pri la unua disdivido de la jaro, kiu korespondas al aŭgusto-septembro-oktobro ĉar en tiu momento ĝuste komenciĝas la ekburĝonas la vegetaĵoj, kies folioj defalis dum la vintro. Ĉio do renoviĝas je la vido.

Tiel same ankaŭ pri la suno, ĝi ĉiam ĉeestas tamen ĝi duone ekdormis dum tri monatoj. Kio igas la vetero varmega, la *Ntaolo* trafe inventis la proverbon « Intensa suno dum *lohataona* ofendiĝas kontraŭ neniu ». Tio signifas ke ĉiuj devas elteni tiun fortan sunumadon.

Ĉar la *lohataona* alportas renoviĝon de la naturo, tiu parto de la jaro estas senkonteste ankaŭ la komenco de la laboroj kaj ĝi estas la plej riĉa laborperiodo ĉar tiam kamparanoj devas plugi la grundon aŭ forpreni la herbaĉojn de la kultivejo aŭ ankaŭ fosi kanaletojn. Dum la *lohataona*, la *ambiaty*¹ ekburĝonas, la *Ntaolo* rimarkis ke tiam estis la taŭga momento por semi la rizgrajnjon. Ili do semis la rizgrajnojn por la rizplantidoj, tiu tipo de rizo estas nomata *vary vakiambiaty* (rizo plantita dum la ekburĝonado de *ambiaty*). Ĉiuj nepre profitis tiun laborperiodon, tial naskiĝis la proverbo « Luno brilanta dum la *lohataona*, eĉ tiu, kiu turnas sian kapon restas videbla ». Kio signifas ke se oni perdas la tempon danci dum la lunluma vespero, oni riskas maltrafi multajn taskojn kies rezultoj estos de ĉiuj konstateblaj dum la rikolto.



La *fahavaratra*

La nomo signifas « dum la tondra periodo ». La *lohataona*-n sekvas ĝi (novembro-decembro-januario). La suno frapas forte. La pluvo muĝe minacas : pluvetas iom post iom ĝis fulmotondroj akompanas torenton, tial tiu periodo estas nomata *fahavaratra*. Rilate la aspekton de la grundo kaj la ĉirkaŭaĵo, herboj kaj plantaĵoj estas verdaj dum fruktiĝas plimulto de arboj.

Multas la taskoj de la kamparanoj dum la *fahavaratra* : fortranĉi la tigon de la maizoj, planti fazeolon, arakidon, melonon kaj bataton. Cetere, la kamparanoj devas prikli la *vary vakiambiaty* kaj samtempe rikolti la *varialoha*²-n. Kvankam taskoj plenigas la programon de la kamparana vivo, la nutraĵo ekmankas ĉar la rezervo elĉepiĝas iom post iom. La *varialoha* estas disponebla tamen la *Ntaolo* diras ke ĝi estas « kontentiga sed ne sufiĉas por la tuta jaro ».

Koncerne la brutaron, la bestoj aspektas grasaj ĉar abundas la herbaĵoj. Sed aliflanke, pro la ekscesa pluvo, insektoj mortas. La kokinoj ne povas eliri tiel, ke ili maldikiĝas.



La fararano

Malpliigās la pluvo kaj la akvo, tiel la signifas: la lasta akvo) kaj ĝi koincidemarto-aprilo. Tiam oni rikoltas plimulty kaj multnombros ankaŭ la kortotraĵo.

Rilate la okul-spektaklon, la aspekto ne tiom ŝanĝiĝas dum la *fararano*. pluvtorentas de tempo al tempo. Tautilas ĉar ĝi helpas al maturigo de iuj en la rizkampo. Kaj precipe ĝi igas viĝantajn.



Ntaolo nomas ĝin *fararano* (kiu das kun la monatoj februaron de fruktoj, la rizon *vakiambia*-birdoj pro la abundeco de la nu-

de la naturo dum la *fahavaratra* Pluvas intermite, sed abrupte men tiu pluvo dum *fararano* tre rizplantaĵoj, kiuj malfrue restas dolĉaj kaj maturaj la fruktojn fla-

La ririnina

Kiam komenciĝas majo, la *ririnina* sin anoncas (majo, junio julio). Kaŭze de la frosta roso la arbofoliaro defalas. Ekpluvetas kun vento, kiu glacie blovas el la sudoriento tiel, ke fridas la manoj kaj la piedoj.

Ririnina estas la periodo por planti la tigojn de manioko kaj oni eksemas la grajnon de la *varialoha*. Se tro rigora estas la *ririnina*, la roso ĉe herbaro frostiĝas, tion oni nomas *fanala*. Kaj kiam leviĝas la suno, la koloro de *fanala* iĝas pli brilanta same kiel vitro kaj ĝi fandiĝas iom post iom pro la suna varmo.

La *fanala* detruas la vegetaĵojn. La Ntaolo preventis kontraŭ la *fanala*. Kiam ili konstatis ke klare ruĝiĝis la firmamento en la vespero, ili sciis ke *fanala* aperos la morgaŭon matene. Sekve, ili kovris la plantitaĵojn, legomojn... per sekaj herbaĵoj kaj foliaĵoj.



LA FOKONOLONA LAŬ RATSIMANDRAVA

Historie la *Fokonolona* estis starigita de la merina (la tribo loĝanta en la centra altebenaĵo) reĝo Andrianampoinimerina en la XVIIa jarcento por plibone mastrumi sian popolon kaj respondecigi la lokan komunumon antaŭ la multaj taskoj, kiujn la reĝo devis alfronti. Tiam la *Fokonolona* rajtis decidi pri la socia vivo en sia kvartalo aŭ vilaĝo.

La *Fokonolona* neoficiale ekzistadis eĉ dum la kolonia periodo kaj ĝi kvazaŭ tenus legitiman povon antaŭ la okuloj de la socio. Tion ĝuste komprenis kolonelo Ratsimandrava, kiam li enposteniĝis kiel ŝtatestro en februaro 1975. Etimologie *Fokonolona* signifas "grupo da homoj". Sed Ratsimandrava havis alian koncepton pri *Fokonolona*.

Efektive, laŭ tiu kolonelo, la loĝantoj, kiuj disponas *miakatra* (laŭlitere: la vortoj, supro) estis la ĉefa regulo. aferon, li intencis starigi en ĉiu difino de la plej eta parto de Vatoeka-n (kiu estas la ekonomiaj aferoj), kies tasko prezoj de varoj elirantaj el la solidarece prigardos tiun



La kolonelo diskutanta kun generalo Ramanantsoa (dekstre)

Temas do pri ideologio bazita homkolektiĝoj). La vivo de la malbona sed la popolo batalas kaj ne akceptos esti venkita. Necesas starigi sistemon, kiu ebligas al ĝi ŝirmiĝi kontraŭ la krizoj el la pov-avidemo far iuj anoj de minoritato, kiu laŭvice sin ŝtat-renversas reciproke. Por plenumi tiun celon, estas necese starigi respublikon de *Fokonolona*, kiu donos al la *Fokonolona* la povon mastrumi la vivon de sia *Fokontany*. La starigado de tia respubliko deiros de la bazo (la *Fokonolona*) kaj devos esti efektiva en la fino de lia kvinjara mandato.

Fokonolona estas kolektiĝo da kunsultiĝan povon. La *teny* kiuj deiras de la bazo al la Koncerne la ekonomian *Fokontany* (administracia teritorio, t.e. la kvartalo) la mallongigo de Komitato pri estos kolekti procentaĵon el la *Fokontany*. La *Fokonolona* kolektadon.

sur la *Fokonolona* (vilaĝaj popolo estas malbona, ege



Laŭ profesoro Tehindrazanarivelo Jacob, kiu instruas en la Protestanta fakultato pri teologio en Ambatonakanga en Antananarivo, la *Fokonolona*, koncepto filozofia kaj politika regado, lokas la Malagason kaj lian/ŝian komunumon en demarŝon etikan kaj spiritan, t.e. la *fanahy maha-olona* (la spirito, kiu apartigas la homon disde la besto) kaj la *fanahy no maha-olona* (la spirito, kiu igas la homon homa kun ties bona kapableco evolui kaj disvolviĝi).

La koncepto pri la regado far la *Fokonolona* — kiu estas samtempe projekto pri unuopulo kaj pri socio — celas antaŭ ĉio la kreadon de fokonolona esto, kiu estas karakterizita de la disvolviĝo de la personeco tiel individua kiel socia sine de iu mondo de li/ŝi regata kaj ebligas al li/ŝi plifirmigi sian identecon kaj sian disvolviĝon.

Bedaŭrinde, kolonelo Ratsimandrava ne sukcesis plenumi sian politikon ĉar oni atence pafmortigis lin la nokton de la 11^a de februaro 1975. Lia reformo — aŭ pli precize lia revolucio — ĝenis la interesojn de multaj homoj, landoj kaj firmaoj. Pli ol kvar dek jaroj poste, Malagasio des pli sinkas en profundan mizeron kaj denove kelkaj intelektuloj rekomendas la revenon al tiu nocio de ratsimandrava *Fokonolona* kiel solvo al la nuna situacio.



RINDRA, GARDISTO DE KARANA

Infanaĝo malfacila

Rindra aĝas nun 34 jarojn sed liaj unuaj dek kvin jaroj konsistis el ĉiutaĝaj malfacilaĵoj pro la fia sinteno de la patro, kiu drinkadis kaj fumis kanabon. Rindra havas du fratojn kaj unu fratinton, la familio sinkis en la mizeron. Rindra ĉiam memoras pri iu periodo dum kiu ĉiuj membroj de la familio estis trafitaj de malario, ili luprenis etan angulon de iu konstruaĵo en malriĉa kaj malpura kvartalo regata de banditoj. Nur kelkaj geparencoj vizitis ilin kaj alportis al ili manĝaĵojn. Pli poste, la gepatroj reakiris forton kaj provis trovi etan laboron.

Saĝiĝo

Tia situacio muldis la karakteron de Rindra. Kiam li frekventis la gimnazion, lin karakterizis maldiligenteco kaj ribeleco kontraŭ la lerneja aŭtoritato. La gimnaziestro plurfoje vokis lian patrinon pro tio, ke li interbatalis kun aliaj knaboj. Kaj li provis ankaŭ fumi kanabon dum kelka tempo. Pro tio ĉio li ne kapablis sukcesi la oficialan ekzamenon por eniri liceon.

Sed li saĝiĝis. En la gimnazio, li renkontis iun afablan knabinon al kiu li enamiĝis kaj de tiam ambaŭ ne plu disiĝas. Li kompatis la knabinon ĉar ŝi estis viktimo de seksa perforto je la oka jaraĝo. Danke al admono far tiu knabino, Rindra reprenis iom post iom la bonan vivon.

Serioza dungito

Pasis jaroj kaj la gepatra laboro plibonigis la familian vivon.

La patro instigis sian filon tra

pasi ekzamenon por akiri stirpermesilon, kion Rindra sukcese plenumis. Li estis dungita de bonkora firmaestro, hindopakistana deveno, kiu estas aŭtokoncesiulo. En la unua momento de sia dungado, Rindra stiris la familian aŭton de la estro sed kiam la maljunulo emeritiĝis, Rindra estis petita servi lian filon. Rindra sin montris serioza en sia laboro kaj konduto, fakte li abomenis alkoholaĵon kaj provis esti ĉiam akurata. Tion ege aprezis la familio de la firmaestro. Rindra akiris novan postenon, temas pri gardado de la familia domo.

Danĝero gvatas

Tamen lia nova kaj juna mastro ŝatas partopreni feston kun geamikoj dum la semajnfino. Rindra devas akompani lin stirante luksan aŭton.



Kaj la juna estro konfidis al li sian pistolon kaj ordonas al li agi kaj pafi se la situacio postulas tion. Rindra iom tremas sed obeas lin. Dum tiu momento, la mastro eniras kun li prestiĝan kazinon kaj ludas tie dum la tuta nokto. Foje surprizas Rindra-n tio, ke iu alia Karana (hindopakistanano) aŭ Vazaha (blankulo) iĝis nova posedanto de la luksa aŭto ĉar la juna mastro perdis en la

vetludo. Kaj ambaŭ reiras hejmen per taksio. Malgraŭ ĉio,

Rindra ne povas plendi pri sia salajro, ege komprenema estas lia juna mastro.

Iutage, la maljuna firmaestro ordonis al Rindra gardi la magazenojn, kiu troviĝas iom ekster la urbocentro. Ili estis tri gardistoj kaj antaŭ la tagmezo, du ŝtelistoj provis eniri tien. Okazis bataloj kaj Rindra sukcesis faligi de la ŝtelistmano la tranĉilon kaj frapis lian kapon. Venis pliposte policanoj. Sed ekde tiam, Rindra petis de sia mastro ke li ne plu deĵoru kiel gardisto ĉe la magazeno.

Familia tragedio

Rindra kaj lia edzino ĉion provis por havigi al si infanon. Post dek jaroj da geedziĝo, la virino finfine gravediĝis sed okazis problemoj, kiujn provis aranĝi la familia kuracisto.

Kiam la bebo naskiĝis, oni devis enospitaligi ĝin kaj ĝi apenaŭ vivis kvin tagoj kaj mortis. Tio kaŭzis gravan ŝokon por la juna paro. Feliĉe ke unu jaron poste, la edzino denove gravediĝas kaj estas atendanta bebon.

Timi maljuniĝon

Kvankam li bone rilatas kun la mastro kaj la gefamilianoj de la mastro, Rindra timas ke post kelkaj jaroj, li ne plu eltenas maldormi dum la nokto por gardi la domon de la mastro. Li serĉis alian eblecon por trapasi la ekzamenon de futuraj policanoj kaj fariĝi ŝtatoficisto sed li bone scias ke necesas multe da mono por subaĉeti polican decipovulon...

KUNLABORI POR PLANTI ARBOJN

Februaro

La malagasa registaro kutime dekretas februaron la monaton en kiu komenciĝas la arboplantado kaj tio daŭras ĝis aprilo se favore pluvas. Sed ĉi-jare, pluvis nur du aŭ trifoje dum januaro kaj la pluvo revenis nur en la duono de februaro, kio iom maltrankviligis nin.

Kunlabori kun « Les Amis de Wangari Maathai »

Diskutinte kun iu membro de la asocio « Les Amis de Wangari Maathai » en Francio pri la katastrofa situacio de la medio en Malagasio, mi estis iom embarasita kiam li proponis helpi min planti arbojn. Estis la unua semajno de januaro kaj fulmrapide pasis la tempo, mi timis ne esti kapabla plenumi la taskon. Sed aliflanke, se mi rifuzus sian proponon, mi riskus maltrafi oportunecon por mia lando. Do, mi konsentis kaj la traktado komenciĝis. Tamen lia ĉefa kondiĉo estas « Bone prizorgi la ĵus kultivitajn arbojn » kaj protekti ilin kontraŭ forbruliĝo de grundo kaj surtretado far la brutaro.



Serĉi lokajn kunlaborantojn

Mi tuj diskutis kun la membroj de Itaosy Esperanto-Klubo kaj ni estis fieraj mastrumi tiun projekton. Sed pro la malmulteco de nia nombro, ni decidis kontakti la estraron de la skoltismo en nia preĝejo FJKM Bemasoandro. Post interkonsiliĝo, ili konsentis kaj tuj proponis la daton de sabato la 6an de februaro. Ili invitis ankaŭ kelkajn gepatrojn por kune planti arbojn. Estis interkonsentite ke IEK disponigos al cento da partoprenantoj kvin busojn por la transporto sed ĉiu partoprenanto prizorgos pri sia tagmanĝo kaj kunportos ankaŭ ŝpaton. Krome, IEK kontaktis ankaŭ la respondeculon de la centro pri spirita revekigo de nia eklezio FJKM en Antambohomena Mahitsy, kiu havas dudekan hektaron da grundo libera, kiun ĝi volonte disponigas al ni por la arbokultivado. La sola kondiĉo estas ke ankaŭ ĝi partoprenos en la flegado kaj prizorgado de la kultivitaj arboj kaj tiuj arboj estos iliaj posedaĵoj.

Antambohomena Mahitsy

Antambohomena estas unu el la kampara vilaĝo sub la administracio de Mahitsy. La nacia vojo N°4 kondukas nin norde ĝis la 33a kilometra punkto kaj de tie oni orientiĝas al la sudokcidento por atingi la vilaĝon. Vojo el tero kaj polvo 6 km longa kondukas al Antambohomena. La pejzaĝo estas preskaŭ dezerta, tre raraj arboj kaj laterito dominas la ĉirkaŭaĵon. La centro konsistas el granda preĝejo kaj kelkaj domoj por akcepti la akompanantojn de malsanuloj. La centro ja okupiĝas pri resanigado per preĝado kaj per medicina kuracado de drogaĉemuloj kaj aliaj homoj posedataj de demonoj.

Plenumi la taskojn

La unua etapo estas starigi teamon de viroj, kiuj okupiĝos pri fosado de 500 truoj el kiuj 50 estos por la plantado de fruktarboj. Tiuj lastaj bezonas unu kubometran grandecon, kio kostas pli kompare kun la truo de eŭkalipto ekzemple. Necesas al kvin viroj tri semajnojn por fosi ĉiujn truojn, la laboro estis iom malfacila pro manko de pluvo. Poste, ili enmetis en la truojn naturan sterkon (konsistantan el bovfekaĵo miksitita kun akvo kaj sekaj herboj).

Do, la tutan tagon de sabato la 6an de februaro, pli ol cent homoj partoprenis en la arboplantado. Antaŭ la laboro, teknikisto pri arboplantado klarigis al ni la devigajn etapojn kaj ni disdividis la taskojn. Dum la mateno, ni plantis nur eŭkaliptojn kaj akaciojn kaj post la komuna tagmanĝo, ni okupiĝis pri plantado de fruktarboj ĉirkaŭ la konstruaĵoj de la centro.



Jen estis ankaŭ okazo por instrui al tiuj etaj geskoltoj planti arbojn. Antaŭ ol foriri, la respondeculoj de la centro kunvenigis nin en la granda preĝejo kaj dankis nin ĉiujn pro la farita laboro. S-ino Sylviane, membro de IEK kaj samtempe estrarano de skoltismo mallonge raportis pri la vivo de Wangari Maathai kaj instigis ĉiujn imiti la mirindan agadon de tiu virino.

Pli prizorgi la kultivitajn arbojn

Dum kelkaj monatoj, Henriel vizitos ĉiusemajne la centron por kontroli la agadon de la ĝardenisto de la centro kun kiu li kunlaboradas por bone prizorgi la vivon de la ĵus plantitaj arboj. Kaj ĉiumonate li protokolis al « Les Amis de Wangari Maathai » en Francio pri sia kontrollaboro ĝis kiam la arboj sufiĉe grandiĝos.

Perspektivo

Henriel opiniis ke eblas atingi ĝis 80 % da sukceso en tiu unua provo de arboplantado. Jen estas modelo de kunlaboro inter esperantista klubo kaj iu alilanda asocio pri medioprotektado. Ni esperas nur ke la projekto ne haltos tie kaj ĝi eĉ etendiĝos al pli granda skalo. Malagasio estas minacita je dezertiĝo, ni bezonas vian helpon por planti arbojn. Ni uzu Esperanton por kunagadi !!!

SIN ESPRIMI PRI VETERO

Kelkaj unuopaj vortoj

Andro = vetero
 Lanitra = ĉielo
 Rahona = nubo
 Rivotra = vento
 Erika = pluveto
 Masoandro = suno
 Manga = blua
 Mainty = nigra
 Fotsy = blanka
 Mafana = varma
 Mangatsiaka = malvarma
 Aloka = ombro



Bona vetero

Manga izany lanitra izany (=Bluas la ĉielo).
 Tsara ny andro androany (Bona estas la vetero, hodiaŭ).
 Mafana ny andro (Varmas).
 Tena midanika be izany andro izany (ege forte varmas nun).

Malbona vetero

Avy ny orana./Manorana ny andro (=Pluvas/Pluvas la tago).
 Ratsy ny andro androany (=Malbonas la tago hodiaŭa).
 Manerika ny andro (=Pluvetas)
 Manavandra ny andro (=Hajlas)
 Mitselatra ny andro (=Fulmas)
 Milatsaka/Mirefodrefotra ny varatra (=Tondras)
 Mikotroka ny andro (=Tondro muĝas)
 Mandrivodrivotra izy izany (=Blovozas nun).
 Mandondona be ny orana (=Minacas pluvo).
 Misy rivo-doza avy any atsinanana (=Ciklono alvenas de la oriento).



Mangatsiaka ny andro (=Malvarmas la vetero).
 Mamirifiry ny ririnina (=Ege frostas la vintro).

Efiko de la vetero

Tsemboka noho ny hafanana aho (=Ŝvitas pro la varmo mi).
 Main'ny masoandro aho (=Bruligita de la suno estas mi).
 Mangovitry ny hatsiaka aho (=Tremas pro malvarmo mi).
 Azoazoko ery ny aiko eto ambany alokaloka eto (Sentas mi agrable sub tiu ombro).
 Lenan'ny orana aho (=Humidigas min la pluvo).
 Mangetaheta aho noho ny hafanana (=Soifas mi pro la varmo).

LA UNUJ TAGOJ DE NOMAD' KURSO

Sylviane kaj mi provis eliri laŭeble frue nian domon ĉar trafikŝtopiĝo sur la akso al la internacia flughaveno persistaĉas. Ni alvenis en Ivato iom antaŭ la 9a matene kaj rendezuis kun Dina kaj Gynet antaŭ la soldata kazerno. Kiam alproksimiĝis la 10a 30, horo de la alveno de niaj gastoj, ni decidis eniri en la areon de la flughaveno kaj komencis atendi la muĝadon de aviadilo el eksterlando. Tamen nenio okazis kaj ni ĉiuj pensis ke denove malfruiĝis la aviadilo el Parizo same kiel tio okazis jam de kelkaj monatoj.

Finfine eksvarmis en la halo de la flughaveno. Dina kaj Gynet ne plu estis videblaj. Mia edzino kaj mi, akompanitaj de mia bofratino, staris ĉe la ĉefa elirejo de la internacia flugado kaj provis rigardi de ekstere tion, kio okazis en la halo. *Vazahaj* kun pezaj valizoj sinsekve eliris kaj tuj renkontis sian respektivan akceptanton. Mi provis telefoni Dina-n sed mi malsukcesis. Fine ŝi anoncis al mi ke la gastoj estis jam tie sed okazis eta problemo pri la bagaĝo de unu el ili.

Kiam maldensiĝis la homoj en la halo, Sylviane mansignis al mi ke ŝi ekvidis grupon da *Vazahaj*, kiuj atendis ĉe la elirejo de la polica kontrolejo. De mia loko mi rimarkis iun altstaturan barbulon. Sylviane instigis min plu iri enen de la halo. Ni estis iom embarasitaj pri kie komenci saluti. Mi ne plu memoras kiun ni la unuan kissalutis ĉar mi ne kapablis enkapigi la nomojn de ĉiuj el niaj gastoj malgraŭ tio, ke Evelyne jam sendis al ni la foton de la grupo. Min surprizis la fakto ke kelkaj el niaj gastoj vere miris renkonti min ĉar ŝajnas ke « ili aŭdis multon pri Henriel ». Mi eble iom hontetis ĉu mi vere indas je tiom da estimo kaj mi timis esti ne inda. Tuj okazis aparta babiladeto kun JoPo kaj Evelyne kaj poste kun Laurent, kiu menciis ion pri la de mi verkita romano *Heroo de l'ĉiutagaĵo*. Aliflanke, mi devis alproksimiĝi al JoPo ĉar li mallaŭte parolis kaj sub lia densa barbo apenaŭ videblis la movo de lia liparo.



Niaj vojaĝantoj alproksimiĝis al la verda buso, kiu atendis nin en la vasta parkejo aliflanke de la ĉefa konstruaĵo. Almozpetantoj invadis nin kaj estis iom malfacile suprenigi ĉiujn bagaĝojn. Poste, nia aŭto postsekvis la buson sed ni ne ĉiam sukcesis pro ĝia rapideco. Preskaŭ unu horo pasis por zigzagi tra la densa trafiko kaj ŝtopiĝo tie kaj ie sed finfine ni atingis la hotelon nomitan 87 en la kvartalo Manjakaray. Ni malsuprenigis la bagaĝojn kaj Dina aranĝis la aferon pri la ĉambro kaj gastigado de la 15 membroj de Nomad'Kurso.

Duono de la bagaĝaro konsistis el pezaj sakoj kaj valizoj, kiuj entenis diverstipajn donacojn por ni. Gynet petis min helpi lin transporti al la domo de Lala tiun bagaĝaron kaj necesis fari du vojaĝon por plenumi tion. Miaflanke, mi daŭre hezitis ĉu mi akompanos ilin dum tri semajnoj. Aliflanke, alproksimiĝis la vespero kaj kumulonimbuso minace avertis nin pri baldaŭa pluvtorento. Mi sentis la urĝecon tuj foriri ĉar ni devis ankaŭ aĉeti novajn sandalojn kaj grandan sakon por mia vojaĝo. Ni ĝisis ĉiujn kaj promesis veni frufore la morgaŭon. Bedaŭrinde, ni ne plu povis aĉeti ion ajn ĉar jam fermiĝis ĉiuj butikoj. Ni devis elturniĝi kaj Sylviane flikis la ŝiritan parton de iu nigra sako antaŭ ol pleniĝi ĝin per miaj vestaĵoj kaj aliaj necesajoj.



Je la 5a 15 matene, mi vokis taksion 2CV por konduki min al la hotelo tamen en tiu horo kelkaj kvartaloj de la urbocentro jam suferas pro trafikŝtopiĝo. Nekredeble ! Daŭre trankvila estis la ĉirkaŭaĵo de la hotelo kaj unuavide, niaj gastoj estis dormantaj aŭ apenaŭ vekigis. Mi renkontis nian ŝoforon Romule kaj ni ekbabilis pri nia vojaĝo. Jes, finfine mi definitive decidis vojaĝi kun niaj gastoj kvankam mi sentis ke mi iel havos problemon. Romule rakontis al mi ke li estis emerito kaj antaŭe, li servis kiel paraŝutista soldato ĉe RFI Ivato, iom misfama regimento, kiu ofte plenumis la plej fian taskon laŭ ordono far fuŝaj politikistoj. Ni finfine forlasis la hotelon kaj nia verda buso, stirita de Gynet, enŝoviĝis tra vicaron da aŭtoj, veturiloj lante postsekvis unu la aliajn kaŭze de la trafikŝtopiĝo. Por tiu unua etapo de la vojaĝo, Lala akompanis nin ĝis Antsirabe.



Ni fine trafis la By Pass-on, la aŭtoŝoseon ekster la ĉefurbo, kaj pli rapide aliris la nacian vojon N°7. Alproksimiĝis la 9a matene kaj niaj stomakoj borborigis pro malsato. Gynet kaj mi iom hezitis pri la loko, kiu povus provizi al ni matenmanĝon. Des pli ke ni apenaŭ sciis kion niaj geamikoj ŝatus aŭ kutimas manĝi. Ni plu veturis tridekon da kilometroj suden de la ĉefurbo kaj decidis halti ĉe la vojkruciĝo al Ambo-



himiadana. Ni vidis tie etajn butikojn, kiuj proponas kafon kaj *mofogasy*-n (malagasajn fritpastaĵojn). La pasaĝeroj disdividiĝis en plurajn grupojn. Vidinte bananon, JoPo petis min informiĝi pri la prezo kaj ni tuj aĉetis du kilogramojn da ĝi. Kun Anne, Evelyne, Marie kaj JoPo, mi eniris iun vendejon de kafo kaj ni mendis kafon kun lakto. Aliaj mendis teon. Dum la unuaj minutoj, mi sentis timeton ĉu la proponitaj manĝaĵoj plaĉos al niaj geamikoj. Sed mi konstatis ke ja okazis neniu problemo. Mi konstatis ke ili firme decidis adaptiĝi al la loka realo, tio des pli kuraĝigis min plu veturi kun ili.

Iom post iom mi sentis ke ni ĉiuj formas ion komunan tiel same kiel asertas pri tio iu malagasa dirmaniero *Izay iray vatsy iray aina* (Kiu kundividas la saman vojaĝ-proviantojn, tiuj kundividas ankaŭ la saman vivon). Post tio, ni restis momenteton preter la ŝoseo dum la aliaj geamikoj estis serĉantaj necesejojn por eligi sian urĝaĵon.

(Daŭrigota en la venonta numero)



Panoramo de La GRANDA INSULO

celas informi pri la ĉiutaga vivo de simplaj civitanoj en Malagasio

Ĝi aperas antaŭ la 5a de ĉiu monato krom en julio kaj aŭgusto

Abonprezo : € 30 jare la 10 numeroj

Eblas mendi de la redaktoro malnovan numeron senpagan

Redaktoro : FIDILALAO F. Henriel

poŝta adreso : lot IAH 32 bis Avaratsena
MG 102 AMBOHIDRAPETO (Madagascar)

Ĉiujn mesaĝojn bv sendi al :

<henrieldrtv@gmail.com>

Abonperantoj :

- **Michel Metzger**

(Francio) : <m_metzger@orange.fr>

- **Istvan Ertl** (Luksemburgio) ,

kontakto : <istvan.ertl@gmail.com>

bv ĝiri vian pagon al lia konto

ĉe UEA : ''ertl-d''

- **Fidilalao Henriel** Bv ĝiri vian

pagon

al lia konto *Skrill* (*Moneybookers*)

uzante <henrieldrtv@gmail.com> aŭ

al lia UEA-konto: ''fidi-d'' kun

la mencio « Abono al Panoramo »

bv sciigi ankaŭ al la redaktoro vian ekabonadon

Krom aparta mencio, la enhavoj de la gazeto estas

de Fidilalao F. Henriel. Uzado de tiaj materialoj

postulas lian permeson.

Kopirajto©februaro 2016 PGI-HENRIEL



Komence de ĉiu nova jaro, bando da muzikistoj ludas antaŭ via domo



Supre: vojo preter tiu kanalo senavertile haltas tie.

Sube: Vendistoj de spongoj proponas siajn varojn ĉe la ŝoseo.



Kampanoj kutimas donaci al sia ĵus edziniĝinta filino kelkajn membrojn, kiujn ŝi kunportos al sia nova hejmo.

Pligrandigitaj fotoj de pluvgutetoj

